


Kajeroj *el la Sudo*



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



DON QUIJOTE DE LA MANCHA



N-ro 27 Julio-Aŭgusto-Septbro 1995



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: Martín Bustín Benito
Apartado de Correos n-ro 4143.
E-03080-ALICANTE (Hispanio)

Sekretario: Jesús de las Heras Giménez
Av. Juan Carlos I, 24. 2/G. Edif. Nueva Ronda, 1.
E-30008 MURCIA (Hispanio)

Provizora Kasisto: Martín Bustín Benito
Apdo de Correos n-ro 4143. E-03080 ALICANTE (Hispanio)
Monsendoj de kotizoj kaj abonoj, ankaŭ el eksterlando per
Poŝta Kaso al: "Caja de Ahorros" Libreta n-ro 37-02.614.635 (Ofic. 1302-0482,
E-03012-ALICANTE (Hispanio). Sen aldona sendokosto en Hispanio.

Redaktoroj de la bulteno:
Antonio MARCO BOTELLA
Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º C.; 50002-ZARAGOZA (Hispanio)

Miguel FERNÁNDEZ MARTIN
C/Santa Genoveva, 58, 6º C.; E-28017 MADRID. (Hispanio)

Kovrilo: La aventuro de Don Kifoto kontraŭ la ŝafoj.

Enhavo:

Ĝis kiam ni toleros?	3/4	Pg.
Recenzo pri nova libro.	5/6	"
Pri skatologio kaj alio	7/8	"
Trompa trudado de la hispana lingvo	9/10	"
Bonvolu ridi... sed ne trol!	11/14	"
Mi estis en Gdansko	15/17	"
Emilio Gastón en mia retino	18/20	"
La Movado en kaj ekster Iberio	21	"
Nova prilozofia verko	22	"
La 68-a SAT-kongreso en Maribor	23	"



Ĝis kiam ni toleros?

Kun surprizo kaj indigno, ni, liberamaj homoj de la mondo, legas ĉiutage en niaj ĵurnaloj aŭ suferas en nia propra karno la teruran grimpadon de nazioj, radikalaj naciistoj kaj reakciuloj survoje de la teroro kaj murdado. Ili atakas la plej elementajn homajn rajtojn de la individuoj, damaĝas la pacon de la civitanoj kaj ne malofte murdas senkulpajn homojn...

Antaŭ kelkaj tagoj la ĵurnaloj informis pri terura batado al nederlandano en Barcelono nur pro rasaj motivoj, kaj kelkajn semajnojn pli frue, pri murdo de junulo sur Madridaj stratoj, en ambaŭ kazoj fare de junaj bandoj de "razkapuloj", t.e. nazioj. Tiuj ne estas la unuaj kazoj, ja similaj krimoj, bedaŭrinde, ripetiĝas en Germanio, Francio, Anglio kaj aliaj landoj. Antaŭ ne multaj semajnoj, en la urbo kie ni redaktas tiun ĉi kronikon, alia el tiuj bandoj batadis senkompate dum sama nokto, unue, povran senhelpan enmigrinton, ĝis ili lasis lin surtere grave vundita. Tuj poste, ili ripetis similan «heroajon» per botoj fere garnitaj kontraŭ granda nombro da maljunaj mizeruloj, kiuj kutimis kolektiĝi en publika placo. Simile kiel en tempo antaŭa al la lasta mondmilito, tiuj krimuloj volas pravigi tian aĉan konduton en la nomo de raspurigo kaj por la "gloro" de la patrio... Ĝis kiam ni toleros tiujn degenerintajn bestojn?

En Centra Eŭropo, eksplodo de naciismaj aspiroj revivigis la plej tragediajn dramojn de multaj popoloj en antaŭaj militoj: bildoj de koncentrejoj, scenoj pri humiligoj, perforto, malsato, detruo kaj murdado aperas en ĵurnaloj kaj televido kiel atesto pri io nepravigebla. Torturoj, ekzekutoj, krimoj kontraŭ la homaro tute nepardoneblaj, nur ĉar oni volas starigi landlimojn kelkajn kilometrojn pli aŭ malpli malproksime, aŭ ĉar la rasfiero de certaj arongantuloj volas elmontri iliajn makabrajn instintojn... Ĝis kiam ni toleros tiujn fondantojn de patrioj, kiuj eksportas sisteme la murdon kaj tamen toleras en la propra hejmo maljustan socion kun karakterizoj nedemokrataj?

Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis en nia Redaktejo broŝuron en Esperanto, senditan sendube, de kelkaj el tiuj "patriotoj", kiuj volis pravigi murdojn kulpante la aliajn pri similaj faroj: krimo ne pravigas alian krimon! Kompreneble en tiu broŝuro ne aperas la pravigitoj en la momentoj, kiam ili praktikas homoĉason sur urbostrato kaj lerte vundas virinojn kaj infanojn. Ne aperas hospitaloj masakritaj de potencaj kanonoj, nek torturistoj aŭ mil kaj unu aliaj krimoj, kiuj ne havas eksplikon en Esperanto nek en iu ajn alia lingvo. La uzo de paca lingvo Esperanto, kiel instrumento por klarigo de malhumanaj naciismaj celoj, estas, niaopinie kaj minimume, alia perversa decido, evidenta eraro...


Ekzistas aliaj naciismaj terorismoj en niaj urboj, inter ili tiu de la ŝtato aŭ de certaj minoritatoj, kiuj intencas konvinki la aliajn civitanojn per pistoloj kaj bomboj. Ni abomenas tiujn "savantojn" de popoloj kaj laŭte denuncas tiajn farojn kiel neeksplikeblajn krimojn... Ĝis kiam ni toleros tiujn agresojn de nazioj, naciistoj kaj reakciuloj kontraŭ la paco kaj la homaro? Batalo por plibonigo de sociaj konkeroj, por liberoj kaj homamaj celoj povas pravigi en konkretaj kazoj la uzon de perforto, sed neniam por fondo de novaj patrioj aŭ tribaj aspiroj aŭ por distingo kaj elstarigo de rasaj fokusoj kaj etnaj sanktejoj. Kaj bonvolu ne aludi la defendon de kulturo, ĉar pistoloj kaj bomboj ne kongruas kun civilizacio kaj kulturo. Ĉiukaze oni devas esti ĉiam inda je la pluekzisto de la homaj rajtoj de la individuoj. Progresema moderna socio postulas jam de antaŭ longe kaj por ĉiam malaperon de ĉiuj baroj inter homoj, bezonon de solidara politiko, kiu unuigu la homaron, ĉar sen tutmondaj organizo kaj celoj ni ne atingos superi la primitivan socisistemon de la kavernoj, al kiu ŝajne strebas tiuj patriotoj... Mizero kaj malsato ne povas malaperi de la mondo dum tiuj agresemaj minoritatoj sin okupas egoisme garantii la propran modelon de sia **senmakula patrio kaj**

raso, ĝuste kiam ni estas ĉe la sojlo de la dudekunua jarcento, kaj tiuj tribaj distingoj estas nur signoj de pasintaj tempoj regresemaj...

Cetere, ni klare diru al la eldonantoj de la citita broŝuro, ke ne validas pretekstoj, kiuj intencas pravigi krimojn citante alies fiagojn. Esti serbo aŭ muzulmano ne ŝanĝas la fian karakteron de maljusta ago, eĉ se eksplikata en Esperanto, ĉar paco havas nur unu solan vizaĝon. Nu, sinjoroj naciistoj: bonvolu ne ripeti vian eraron uzante Esperanton por pravigi krimojn, ĉar tio, anstataŭ ebligi la komprenon de via konduto, inklinigas nin al naŭzo.

La Redakcio

RECENZO PRI NOVA LIBRO



Lirikaj Perloj de Al-Andalus, de Antonio Marco Botella. 327-paĝa, eldonita **Fundación Esperanto**. Ilustrita per fotoj kaj belaj desegnoj pri al-andalusaj monumentoj ankoraŭ ekzistantaj en Hispanio. Prezo 1.900 Ptoj + sendokosto, aŭ ekvivalento en nederlandaj guldenoj, mendebla ĉe Libro-Servo de HEF aŭ **Fundación Esperanto**; San Vicente de Paul 1, Entr. 50001-Zaragoza (Hispanio).

Ĝus aperis en bela vesto verko pri kiu nun mi celas nur komentarieti, ĉar ĝi meritas ja pli ampleksan recenzon.

Lirikaj perloj de Al-Andalus estas titolo kiu ŝajne sugestas bukedon, faskon da poemoj de tiu ankoraŭ nebulplena, pridiskutata kaj tamen sendiskute interesa periodo, kiun de la jaro 711 ĝis 1492 oni nomis **araba, islama aŭ araba-hispana**: la tiama, nun legenda kaj ignorata Al-Andalus.

Tamen la libro estas ja multe pli ol tio kion la titolo sugestas: En ĝi oni trovas biografiojn, travivaĵojn, poemojn, historiajn okazintaĵojn, ktp., ĉio lerte, amuze interesplene plektita. Vere ĉiun paĝon parfumas arda, nebrensita liriko kaj amo, ankaŭ nostalgio pri paseo kie brilege lumis poezio, filozofio, medicino, matematiko, astronomio... apud, bedaŭrinde senĉesaj bataloj, murdoj, konspiroj, perfidoj...; rafinitaj moroj apud sensencaj kruelaĵoj, sangosojfaj tiranoj apud universalaj saĝuloj, nepriskribeblaj riĉaĵoj apud neelteneblaj mizeroj, doloroj kaj morto.

Ĉi tiu 327-paĝa libro riĉas je 179 poetoj, la plej brilaj el tiu epoko, multaj el ili ne nur poetoj sed ankaŭ filozofoj, filologoj, juristoj, sciencistoj... kio postulis serĉi, konsulti, trastudi centojn da verkoj kaj dokumentoj de publikaj kaj privataj bibliotekoj kie verkoj pri ĉi temoj nekredeble sed malfeliĉe malabundas. Tiuteme ĉi verko estas unika juvelo ne nur en Esperanto sed, mi ne hezitas diri tion, en kiu ajn nacia lingvo.

Bedaŭrinde, sed ŝajne neeviteble, makulas la tekston preseraroj kiuj spitis la sendube zorgan kontroladon de la aŭtoro. Krome, ankaŭ neeviteble, historiistoj, arabistoj, eruditoj k.a. trovos diskutebajn eĉ diskutindajn interpretojn, kio ja estas ordinara okazo en tiuj temoj, ĉar historio estas ĝangala labirinto kie svarmas preskaŭ tiom da opinioj kiom da historiistoj.

Resume, libro bele presita kun okulfrapa arta kovrilo kaj riĉa interesplena tute neordinara enhavo. Vera verka juvelo por ĉiuj kiuj ŝatas historion, literaturon, unuvorte: beletron. La subskribinto, kiel kutima leganto de tiu literaturo, varme rekomendas la libron ne nur al amantoj de historio kaj liriko, sed ĝenerale al ĉiuj legemuloj.

José M^a CALO

PRI SKATOLOGIO KAJ ALIO

La hispandevena venezuelano Fernando de Diego festis sian 75-jaran jubileon en decembro lastjara. Lia datreveno spilis barelon da komentoj kaj menciotoj, kies tembron ordinaro stampis senargumenta panegiremo. Feliĉe ne mankis ĉi-torente du seriozaj kaj salutindaj studoj super la produktivo (1)(2). Se ne la solaj ĝis nun, almenaŭ raraj, ĉar la faman tradukiston oni kutime laŭdas dio aŭ skoldas diablo, sed malofte esploras kompetente kaj senpartie.

Ĉi-jubilee tamen kelkajn publicistojn ŝajne atakis la modo superpedanti etajn stilerajn de la karakasano, kun la celo implicite draŝi lian tutan traduklaboron. Unua ĉi-vente boardis la aŭstralia Trevor Steele (cetere mem tre bona stilisto), kiu kaptis la okazon de recenza tasko (3) por fari al li bonan lavon pro la uzado de pronomo *nul*.

Dua krozis la poldevena britino Krys Ungar. Sub la ŝirmo de eseo tradukkompara (4), ŝi regalis lin sur la oreloj per doktoreca ulno (5), akuzante lin aroganta, misscia pri la angla lingvo kaj nekompetenta pri bibliografia laboro. Ŝin perfidis tamen komparcela apudigo de du versioj de du eroj el la romano *D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde*, unu el la plumo de Albert Goodheir, alia el la ateliero de De Diego. Paralelpaĝe metitaj post ŝia eseo, tiuj versioj frape atestas ke la venezuelano superstilas la nederlandanon, dementante la aserton de Ungar pri la redono de De Diego: "Tiu lasta traduko aldonas nenion, nek stile, nek komprenige, al la laboro de Goodheir". Se ŝi ne almetintus la versiojn komparcele, la legantoj devus konfidi al ŝia juĝo, kvankam ilin eble suspektigus ŝia ŝovinisma pafado samalinee: "iom arogante alilingvano arogas al si la taskon traduki el la angla". Tamen antaŭ la paralelaj versioj ĉiu povas kompari kaj decidi mem. Ekz. laŭ mia komparo de la versioj sur p. 24, De Diego superatutas la nederlandanon sepfoje, dum ĉi lasta lin venkas nur trifoje.

Laste sed ne balaste, al ĉi ĥoro aliĝas neniu alia ol Bernard Golden (7), fama pro siaj (pravaj) lingvoskurĝoj. Ekirante el leksikologia mispaŝo de De Diego (8), Golden lekcias pri *eskatologio* kaj *skatologio*, prezentante, kiel kutime, abundan farĉon de difinoj, etimoj, argumentoj kaj leksikografiaj

referencoj. Tamen la pravon kaj ravon de lia erudo stompas la hasto kaj drasto de lia konkludo, ke pri leksikologio De Diego... ne kompetentas!

Oj! Golden devus gardi sin de tiaj bruskaĵoj. En aligazeta artikolo (9), aperinta preskaŭ samtempe, ankaŭ li stumblas sur la leksikologia tereno, erudante pri "lazo, ĉe kies finaĵo ligiĝas du aŭ tri pezaj ledkovritaj buloj el ŝtono aŭ metalo". Ve, Berĉjo! Buloj el rigida ŝtono aŭ metalo? Evidente ĉi-loke temas pri globoj, ne pri buloj! Eĉ la povra Kabe, "renegata fuŝleksikografo" (laŭ etikedo de Golden mem), povintus lin instrui pri la ĝusta signifo de *buloj* (10)...

Ĉu el tiu peko, eventuale hapaksa (11), oni samhaste konkludu ke Golden ne kompetentas pri leksikologio? Aŭ ĉu oni apliku la indulgemon de Jan Harselaar (12), kiu unua elspuris la konfuzon de De Diego, sed saĝe reeĥis la faman diron pri la granda Homero kelkfoje dormetanta? Mi ne dubas elekti la duan, ĉar la leksikologiaj kapabloj de Golden ŝajnas al mi neriproĉeble solidaj kaj gratulinde fekundaj, malgraŭ disfojaj stumbloj. Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro!

Gonçalo NEVES

- (1) FERNANDEZ, Miguel: Pri *Cigana Romancaro*. En *Iltis-Forumo* 6. 1994: 3, p.75-89.
- (2) VATRÉ, Henri: Pri versaj tradukoj de Fernando de Diego. En *Iltis-Forumo* 6: 1994:3, p.90-93.
- (3) STEEL, Trevor: Eble soleca, sed abunde krea. En: *Esperanto* 87.1994: 12, p.210.
- (4) UNGAR Krys: D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde: 75 jaroj de Esperanta tradukarto. En: *Fonto* 15. 1995: 169, p. 13-21.
- (5) Bedaŭrinde PIV ne registris ĉi signifon de ulno. («ulnolonga liniilo el fortika ligno, iam misuzata kiel batilo»), plurfoje renkontebla almenaŭ ĉe Kabe (6).
- (6) GRIMM, Jakob kaj Wilhelm: *Elektitaj fabeloj*. Trad. Kabe. Berlino: Esperanto Verlag Möler & Borel 1906, p. 55-56, 123, 124.
- (7) GOLDEN, Bernard: *La diferenco inter eskatologio kaj skatologio*. En *Kajeroj el la Sudo* 6. 1995: 25, p.16-19.
- (8) DE DIEGO, Fernando: Recenzo pri *Du virinoj*. En: *Fonto* 14. 1994: 157, p. 33.
- (9) GOLDEN, Bernard: Asimilado de hispanlingvaj etimoj finiĝantaj per S. En: *Boletín* 320. 1995: 2, p.18-19.
- (10) KABE: *Vortaro de Esperanto*. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo 1984, p.22.
- (11) HAPAKSO: vorto nur unufoje trovebla en skribita lingvo (NG, p.26).
- (12) HARSELAAR, Jan: Kelkaj notoj pri recenzado. En *Fonto* 14 1994: 161, p. 9-12.

Trompa trudado de la Hispana Lingvo

Ŝercoj pri lingvoj

Inter la speco de ŝercoj, kiu plej plaĉas al mi, estas tiuj temantaj pri lingvoj. Mi jam konstatis, ke kelkaj estas preskaŭ "klasikaĵoj", ĉar ili estas ofte ripetitaj, ne nur en la sama lando sed ankaŭ transnacie. Jen ekzemplo de humura okazintaĵo, kiun mi aŭdis la unuan fojon en Usono kaj post multaj jaroj ankaŭ en Meksiko. Temas pri junulo, kiu iris al Francio por studi kaj baldaŭ trafis en embarason ĉar lernado de la nova lingvo prezentis al li nesupereblan malfacilaĵon. Sekve, li sendis urĝan kablogramon al siaj gepatroj, petante helpon: "Kion mi faru? Mi troviĝas en tre malbona situacio. Mi ankoraŭ ne sukcesis lerni la francan lingvon kaj mi komencas forgesi la anglan!" Alian version de la sama ŝerco mi aŭdis, kiam mi estis en Meksikurbo kaj loĝis en pensiono kun meksikaj kaj boliviaj studentoj. Unu el tiuj ĉi, pro malkontento pri studado en Meksiko, decidis iri al Universitato en Teksaso, Usono. Ni atendis novaĵojn de li, kaj fine venis letero, en kiu li plendis, ke li ankoraŭ ne komprenas la anglan sed nun estas forgesanta la hispanan! Kompreneble, tiu letero estis pura blago.

La dua "klasika" ŝerco pri lingvoj, kiun mi aŭdis plurfoje, rakontas pri eksterlanda turisto, kiu alvenas al hotelo kaj petas informojn pri la havebleco de ĉambro. Li ekparolas angle, sed la akceptisto ne reagis. Tiam la eksterlandano provas demandi en la germana, franca, itala kaj ankaŭ en la hispana, sed la hoteldeĵoranto nur nee skuas la kapon. Fine la senespera vizitanto ekparolas en Esperanto: "La afiŝo sur la muro tekstas: *English spoken, Man spricht deutsch, On parle français, Si parla italiano, Se habla español*. Kial vi ne respondis miajn demandojn, se vi parolas tiom da lingvoj". "Ho, pardonon, sinjoro, vi ne komprenas. Parolas tiujn lingvojn ne la hotel-stabanoj sed niaj gastoj".

Tre bela rakonto el trans la monto

La tria ekzemplo de ridiga historieto rilatanta al lingvoj diferencas de la aliaj du, ĉar ĝi ne estas simpla ŝerco sed apartenas al la ĝenro de anekdotoj aŭ, prefere, folkloraj rakontoj. Ne eblas identigi la rolantojn nek la aŭtoron, t.e. la unuan, kiu elcerbigis kaj konigis ĝin. Instruisto en klaso



Globus kun propagando pri la planlingva projekto **Panamericano** -*lingua latino-americana auxiliare*-, kies aŭtoro estis Prof. Star (pseŭdonimo de Werner Stern), germano loĝanta en Malago, Hispanio. Jen ankoraŭ unu versio de la sama anekdoto, tradukita el la anglalingva teksto de Prof. Star en **Globus**: "De Berlino iu preparis sin por elmigri al Brazilo. Li akordiĝis

de la hispana lingvo, kiun mi lernis en mezlernejo de Novjorko en la jaro 1940, rakontis pri hispanamerikano, kiu, kiam li estis studento en Germanio, legis en gazetanonco pri germana komercisto, kiu intencas vojaĝi al Brazilo kaj volas akiri scion de la portugala lingvo. La junulo kontaktis la germanon kaj proponis doni privatajn lecionojn, sed, ne sciante la portugalan, li instruis la hispanan.

Post kvaronjarcento mi troviĝis en Hispanio por studi la arkeologion, kaj dum la landa arkeologia kongreso en 1964 mi renkontis en Seviljo simpatian hispanon, kies profesia laboro estis la tradukado de lingvoj. Lun tagon li rakontis pri siaj travivaĵoj kiel studento en Germanio, kaj ridetante prezentis sin kiel la hispanlingvulon, kiu instruis al la nesuspektanta germano sian propran lingvon kaj ne la portugalan. Ĉar mi jam aŭdis la saman rakonton el alia fonto, mi sciis, ke li senhonte mistifikis.

Ankoraŭ unu jardeko forpasis, kiam trafis en miajn manojn ekzemplero de la periodaĵo

kun ruza lingvoinstruisto, kiu lernigis al li tre bonan hispanan lingvon, ĉar li ne sciis la portugalan. La trompo estis malkovrita poste en Brazilo"...

Mi supozas, ke ankaŭ pluraj legantoj de **KAJEROJ** konas tiun ĉi historieton. Mi scivolas pri la precizaj cirkonstancoj kaj, ĉu ĉiam temas pri hiapane-parolanta persono, kiu trompe instruas la portugalan al germano? Ĉu estas eble spuri la rakonton en publikigitaj fontoj por ekscii la daton, kiam ĝi estiĝis?

Bernard GOLDEN

BONVOLU RIDI...SED NE TRO!



La horloĝo de Newton

Iun tagon estis Newton absorvita en siaj profundaj filozofiaj meditoj, kiam lia servistino eniris en lian laborĉambron. Ŝi alportis kaserolon kaj freŝan ovon, kiun ŝi volis kuir en ĉeesto de sia mastro por tuj servi lin per ĝi: tio estis la ĉiutaga matenmanĝo de la scienculo.

Newton, kiu volis resti sola, ordonis al la servistino, ke ŝi foriru, ĉar li

mem kuiras la ovon.

La servistino metis la ovon sur la tablon apud la horloĝo de l'

filozofo, konsilante, ke li lasu la ovon nur dum tri minutoj en la bolanta akvo; kaj ŝi foriris.

Imagu ŝian miron, kiam ŝi revenis post horduono por purigi la tablon kaj trovis sian mastron staranta antaŭ la kameno kun la ovo sur la mano kaj la horloĝo en la bolanta akvo de la kaserolo.

Kontentiga solvo al malfacila situacio

Kuracisto informis sian pacienton pri tio, ke al li restas apenaŭ ses monatoj da vivo. Tiam la malfeliĉulo demandis al la doktoro:

-Doktoro, kion mi povas fari?

La kuracisto respondis lin tuj:

-Unue, disdonu ĉiujn viajn havaĵojn; poste iru en arbaron loĝi en kabano; poste edziĝu kun vidvino havanta almenaŭ ses gefilojn.

-Kaj tiel ĉu eble mi plu vivos?- diris la malfeliĉulo.

-Ho, tute ne! Sed estu certa, ke vi vivos la ses monatojn pli longajn el via tuta vivo!

La vera vivo

En amika rondeto oni debatas pri la komenco de la vivo. Kelkaj opinias, ke la vivo komenciĝas en la koncipigo; aliaj asertas, ke nur post la naskiĝo oni povas konsideri la vivon kiel aŭtentan. Maljuna kaj ŝercema virino kontraŭdiras ĉiujn opiniojn kaj, demandite pri la ŝia, respondis:

-Kiam la edzo forpasis kaj la gefiloj forlasis la hejmon, tiam la vera vivo ja komenciĝas!

Laborema homo

Dum proceso, la juĝisto klamas kontraŭ la kulpulo kaj senpacience diras al li:

-Ĉu ne bedaŭrinde, ke oni kulpigas vin pri tio, ke mi ŝtelis dek fojojn en unu semajno?

-Vi pravas, sinjoro juĝisto, ĉar mian ekzemplon malmultaj imitas, ĉar, se ĉiuj estus tiel laboremaj kiel mi, alia estus la ekonomio de nia lando!



Bona memoro

En lernejo lernanto diras al sia instruisto:

-Sinjoro, mi ĉiam memoras la fabelon pri la azeno, kiun vi rakontis al ni pasintjare.

-Ĉu vere ĝi tiom ridigis vin?

-Ho, jes, sinjoro, multege. De tiam mi ne povas vidi azenon sen rememori vin!

Ruza respondo de knabo

Ĉarlatano vendanta ĉiokuracajn rimedojn surstrate invitas liajn aŭskultantojn aĉeti siajn produktojn:

-Gesinjoroj, ĉi tiu siropo ne nur resanigos vin je via kapdoloro, reŭmato, alta sangopremo kaj gripo, sed ankaŭ alportos al vi tre longan vivon! Alrigardu min, ĉu vere mia aspekto laŭas al mia aĝo, t.e. 150 jaroj?

Naiva viro volas scii la veron pri la menciita aĝo kaj demandas al la vendohelpanta knabo:

-Knabo, diru, ĉu vere tiu sinjoro estas 150-jara?

La knabo senhezite respondas lin:

-Nu, mi ne povas tion certigi al vi, sinjoro, ja mi helpas al li nur de antaŭ 75 jaroj.

Fantazia logiko de infanino

-Panjo, kiam mi estos pli aĝa mi volos esti edzino de mia avo- diras infanino al ŝia patrino.

-Sed mia kara, tio ne estas ebla ĉar tiel vi estus edzino de mia patro-

respondas la patrino.

-Sed tio ne gravas, ĉu ne?- respondas la infanino kun certalogiko. Rimarku, ke vi estas la edzino de mia patro!

Grava rekomendo

Foririnte el la Universitato, studentoadiaŭas sian patron kaj *tenere* diras lin:

-Adiaŭ kara patro! kaj neforgesu skribi al mi de tempo al tempo sur unu ĉekon!

Prava malĝojo

-Kial vi estas tiel malgaja, amiko?- demandas homo al cirkoservisto.



-Ĉar mortis la elefanto.

-Ĉu vere vi tiom amistu bestegon?

-Mi ne scias klare vin respondi, sed pensu, ke la direktoro ordonis min enterigi ĝin sen alia helpo.

Tomás Serrano ricevis la premion **Mingote** per tiu ĉi spritaĵo genie elpensita.

MI ESTIS EN GDANSKO

(Impresoj pri la 14a ILF)

Reveno el Pollando. Madrido fajras: pli ol kvardek gradoj! Sed min karesas plu la frisko de la pasinta nokto varsovia, neforgesebla nokto de festo kaj amikeco kaj tilioj trans balkonaj balustradoj. Dankon, dankon, dankon, kara Ada Fighiera!

Varsovio estas verdo tranĉita de la vistula bluo. Kaj nebridebla emo al transviviĝo: la antikva kvartalo, fenikse renaskiĝinta el siaj cindroj — ve, la milita barbareco! — per enorma kunforto fizika, vola, ama. Same, la antikvan Gdanskon oni ŝton-sur-ŝtone rekonstruis el militruinoj. Kio do povus iam neniigi ĉi popolon?

En Gdansko ni, ĉirkaŭ tridek e-beletremuloj el naŭ landoj, parolis pri amo: 14a Internacia Literatura Forumo (*Amo en poezio kaj en prozo*). Ĉu ne tre magra nombro da homoj? Nu, sendube jes, sed nur se konsideri, ke la altan nivelon de la prelegoj kaj artaj prezentoj de mi spektitaj meritintus ĝui multe pli da — ĉiuj — bonaj gustumantoj de nia kulturo. Cetere, ĝuste ĉi neamasa partopreno generis etoson pleje taŭgan por interŝanĝo de literaturaj spertoj kaj zorgoj.

Aŭtenta sukceso. Ene de mi scintilas plu la poemoj de la polino Halina Poświatowska. Ŝian poetan staturon kaj personecon senvualigis Tomasz Chmielik, filologo, ĝisosta pasiigito de beletro, verva, vera sciofonto, esperantiginto de tridekelkaj verkoj!... Ene de mi resonas plu la satena voĉo de Anjo Amika, kiu ĉe ĉiu modulado malkovras konstelacion de envolvaj sonoroj. (Kiam, Anjo, vi kantos al mi la *Habaneran*, de *Carmen*?) Ene de mi la *Anna* — perfekta — de William Auld kunvivas kun la *Anna* de Jerzy Fornal pro ties majstra enscenigo de la aulda poemo. Ja Fornal rompas la originalan skandon de la verso por krei propran dramon kadencon — *Anna, diskurra kaj enua* — superban... Ene de mi remanencas la adiaŭa vespero aranĝita de la lokaj organizantoj. Elwira Twardowska — resumo de viv- kaj art-amo — surprizis nin kiel reĝisorino de neatendita spektaklo: belaj figuroj gejunulaj en ekzotaj vestoj, en muta ludado apud la publiko; sceneje, bela freŝtembra kantistino, bela dekoro surbaze de polineziaj elementoj; postkulise, ensembla muzikado... Kaj ĉio, en kresĉendo ritma, luma kaj

etosa: totala poezio.

En Gdansko (15a - 19a de julio) ni parolis pri amo. Verse kaj proze. Lertvorte Perla Martinelli gvidis nin en la universon de Boccaccio por prezenti la esperantigon de la unuaj tri tagoj de lia *Decameron*, iniciatitan de G. Waringhien kaj kompletigitan de ŝi mem. Giorgio Silfer pliafoje pruvis sian multflankan kompetenton kaj elokventon per pluraj publikigindaj enkondukoj al diversaj programeroj. La dramaturgo Ljubomir Trifončovski, baldaŭ transprenonta la LF-redaktorecon, prilumis la bulgaran alporton al la ĉeftemo. Sprite kaj amuze — ne am-uze — Valentin Melnikov pritraktis sian tradukon — *Kojonov Luĉjo* — de rusa popularerotika poemego. István Nemere selektis kaj komentis pecojn el nia amprozo... ..

En Gdansko ni eĉ kanzonis francguste — *Ne forlasu min* (Jadwiga Dziulewska) — pri amo kaj senamo.

Min rilate, mi trovis tie la klimaton de intereso kaj spektado, kia ebligas veran interfluon de sensacoj inter komunikemulo kaj la publiko. Dankon, forumanoj. Dankon, organizantoj. Ja via malavara invito donis al mi la ŝancon aktive partopreni tiun altflugan eventon kaj la honoron inaŭguri ĝin festprelege — *Mia lirika ama travivaĵo* —, diskonigi ankoraŭfoje la magian poezion de Lorca — *Sur la spuroj de F.G.L.* — kaj recitali kante kaj deklame, surbaze de mia poemaro *La profil' de viaj spuroj*. Dankon al vi, Judit Felszeghy, enkorpigo de sentivo kaj delikato, pro via mirinda partnerinado en ĉi lasta prezento.

En Gdansko ni forumis kun la koro lokita sur nia kultura specifeco, tamen aperta al la ekstera mondo. Kaj Gdansko reeĥis nian aferon aŝiŝe, radie, televide... Kaj varme bonvenigis nin en la renesanca Urbodomo de la Malnova Urbo per samepokaj — majestaj, belegaj — dancoj kaj kantoj. Kaj aliris nian kulturalan realon kadre de suka kaj instrua renkontiĝo kun polaj verkistoj.

Jes, mi estis en Esperantujo kaj ankaŭ en Gdansko. Kunpromene sur la strato Mariacka, flankumita de marmoraj peronoj renesancaj, mi lasis min kapti de ĝia aero. Du junuloj fagotis. Ĉe la fundo, apud la Verda Pordego, viro violonis. Kaj la muziko elmagiis bunte vestitajn komercistojn surperone, belulinajn okulojn transfenestre... Tuta XVI-a jarcento alflugis tien. Poste ni enŝipiĝis: rivero Motława, ŝipfarejoj, ŝipegoj... Kaj la Balta Maro, ade milda, mediteranee neperturbbla. Eĉ tiam, sub ĉielo ĉiam pli nigranuba, kiu, tuj antaŭ nia albordiĝo ĉe la moleo en Sopot, regalis nin per pluvo kaj per mevoj. Resunis post la manĝo — bongustaj frititaj fiŝoj — en populara restoracio sur la plaĝo. Kaj la vespero transiĝis en brizon kaj promesojn.

Tielis nia ekskurso!

En Gdansko ni parolis pri kundividita amo: beletro. En kaj eksterprograme. Memorindas multaj spontanaj besedoj ĝis malfrua nokto antaŭ botelo da rusa vodko -refoje bondezirojn, Valentin, pro via tridekokjariĝo!- aŭ bulgara blanka vino aŭ ruĝa *Rioja*... Kiom da bonaj vibroj!

Tielis mia 14a Internacia Literatura Forumo. La 15a disvolviĝos venontjare en Hungario: *Esperanto-teatro*. Certe nemistrafenda okazo!

Miguel Fernández

EMILIO GASTON SANZ EN NIA RETINO

Nepo de la federaciisma samnoma esperantisto fondinta en 1908 la esperantistan rondon "FRATECO" de Zaragozo. Filo de grava universitata profesoro, ankaŭ elstara esperantisto, samideano Emilio GASTON SANZ, advokato de ĉiuj utopioj kaj ĉio, kio signifas ribelon kontraŭ privilegioj kaj politikaj sistemoj, nekonformisma poeto kaj amanto de ĉiuj naturestaĵoj, kronikisto pri kosmovizio kaj pasia defendanto de homaj valoroj ankaŭ estas esperantisto.

Emilio Gastón, deputito de la unua provizora Parlamento, fondinto de la Aragona Socialista Partio, ekzistinta nur eksterleĝe dum la diktaturo, estis la unua Popoldefendanto de Aragono dum kvar jaroj, kaj lia fronta malakcepto de la regularo kaj konduto de rutinaj politikuloj faris el lia mandato malĝojan periodon por tiuj, kiuj aspiris politike manipuli lin. Emilio Gastón apartenis dum la diktatura periodo al certa idealisma generacio de junaj aragonanoj, kiuj batalis sub la ombro de niaj arbaroj kontraŭ la sistemo per versoj, kanzonoj kaj iluziiga parolo. Ili ankaŭ verkis, malobeeme, kontraŭ poetikaj reguloj, rompis ĉiajn muldilojn konvenciajn aŭ politikajn kaj neniam perdis la idealismon por la homamaj valoroj, ne ĉiam fidele respektataj de iamaj kompanoj sin nomantaj demokratoj. En 1958 liaj poemoj estis elektitaj por la premio **Boscán**, sed tiu libro estis malpermesita de la reĝimo ĝis la fino de la diktaturo. Emilio Gastón, lirika advokato de arbaroj, estas, kun Miguel Labordeta, unu el la plej elstaraj reprezentantoj de tiu

generacio de aragonaj poetoj, kiuj, de la surrealismo de aragonaj mondoj proklamis per epikaj poemoj la rajton de l' popolo al la iluzio kaj al socialismo, kiam ambaŭ konceptoj simbolis esperon kaj idealon...

Hodiaŭ venas al miaj manoj lia verko **Epika Antologio**, libro de versoj kaj ideoj, kun samaj protestokrioj kontraŭ la konformismo kaj la rutino, kaj kiel antaŭe proklamanta homamajn valorojn, amon al naturo kaj kun rigardoj al kosmo en tiu homa obsedo preterpasi ĉiujn konvenciajn limojn...

Kaj mi volis traduki unu el tiuj poemoj esprimantaj altajn konceptojn ekologiajn kun ekstermondaj aspiroj, kun mil fantazioj tute neimageblaj kaj tamen viglaj en nia fantazia kosmo sonora... Jen la poemo:

SURTERA PLANADREVIZIO

Nepre, ĉiu iluzio
devas havi, kvazaŭ floro,
sian parfumdonan econ,
propran kolektivaronon,
sian ribelemon mildan
kaj surteran kaŭzrezonon.

Fantazion
mia interpreto brodas;
ja mi sentas en la koro
ekribelon nebremseblan
tosti por agraraj mondoj,
mezopotami-rakontojn
kaj geografi-disdonojn.

Utopie,
devas mi profiti eron
venanta al ni el kosmo
por planedaj entreprenoj...

Ĉe velurpejzaĝoj helaj
svarmas fluge cervoformoj,
kaj oraj labrak-riveroj,

kaj nimfar' kun freŝaj pomoj,
kaj domegoj arbo-ŝajnaj
tiklantaj la nubokorpojn
por eltiri akvlamenojn
sunopentritajn per oro,
kaj inter du ĉielarkoj
kun sentivaj fajnaj dozoj
suĉi pacon...

Eskvizite,
kiam oni nin sugestas
sati niajn korbbezonojn,
niajn kaŝajn apetitojn
aŭ la volupteman volon,
oni sentas la inklinon
karesi la herboŝosojn,
kuŝi sur verdo-paŝtejoj
tre proksimaj al la rojoj
kaj al bonodoraj fragoj
dum la brilaj matenhoroj,
kiam ebriiĝparfumo
en afrodiziaj ondoj
invadas la homajn sensojn
sen limigo kaj sen sprono...

Eŭforie,
en tiu naturo-ĝuo
mi min ĵetas kun fervoro
en la meman infiniton;
el l' abism' de homvaloroj
mi invitas pacamantojn
kaj plej progresemajn homojn
tosti kaj proklami ĉie,
ke la ter', nia terglobo,
estas ĉies ĝupropraĵo,
kaj tra tiu inda vojo
mian pacismviolenton
ektoleru sen pudoro...



Kompreneme,
mian revoluciemon
vi toleru sen admono,
ĉar ne kontroleblas sento
kun sincera mesaĝ-sono,
do permesu en la lukto
minimuman esprim-ĝojon.
Planas mi jam paradizon
por estaĵoj kaj por homoj
per ideoj naturamaj
naskiĝintaj en la koroj.

Intertempe,
mi rezignas plensincera
pri pasintaj militgloroj,
pri la Flandra fikonkero
kaj la Amerik-malkovro;
mi forgesi nepre volas
la hegemoniajn blokojn
kaj influojn politikajn,
ĉar aspir' de mia koro
estas unuigi marojn,
kontinentojn, stelojn, homojn...

Iluzie,
mi deklaras kun espero
per ĉi plezurigparolo
l' inaŭguron de l' regado
de libera naturordo:
de la plantoj, la pejzaĝo,
de la amo kaj de l' boskoj.
Nun, permesu min foriri,
eble dum nur kelkaj horoj,
eble dum jarcentoj astraj,
ĉar mi celas, sen sonoro,
rigardadi l'infiniton
kun akompano de floro...



A.M.B.

La Movado en kaj ekster Iberio

SAT-Amikaro kaj Germana LEA-o kongresis en Alzaco

Al nia Redaktejo venis raportoj pri la sukcesa kongreso de ambaŭ LEA-oj okazinta en la alzaca vilaĝo Mittelwihr, en kiu partoprenis ankaŭ TAKE-Esperanto.

Pli ol 200 gekongresanoj partoprenis en tiu sukcesa renkontiĝo de francaj kaj germanaj SAT-anoj, en kiu prelegis k-do Peyraut pri "Sindikatismo dank' al Esperanto" kaj okazis kunveno kun Jean Thierry. Ankaŭ prelegis dufoje Leo Vulfoviĉ, el Moskvo, kaj interese informis pri "Nuntempa Germanio" k-do H. Rodewig. La kongreslaborojn prezidis Pierre Babin kaj Claude Gicquel. La kongreso akceptis unuanime la raporton prezentitan de la Sekretario de SAT-Amikaro, k-do Henri Masson. K-do Degoul, Ternant kaj J. Thierry zorgis pri la ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto.

Vespere, donis distron kaj plezuron al la ĉeestantaro la kantistino Nikolin', kies kanzonoj ĉarmis la gekongresanojn. Tipa folkloro grupo de la regiono dancis kaj dancis la ĉeestantojn. La ekskursoj estis vere interesaj.

La vicurbestro de Orly (apud Parizo), s-ro Schley, invitis al sia urbo por Pasko 1996 la venontan SAT-Amikaran Kongreson. Pli sukceson de SAT-Amikaro en la longa ĉeno de gravaj kongresoj organizataj de niaj najbaroj.

Nova Akademiano kaj merititaj laŭroj.

En la ĵusa voĉdonado por la perioda renovigo de triono de la Akademio de Esperanto elektiĝis i.a. nia portugala kunlaboranto kaj amiko Gonçalo NEVES, juna -verkisto, pri kies granda talento lingva kaj beletra parolas per si mem liaj ne maloftaj kontribuoj sur niaj paĝoj. Aliflanke, kvazaŭ parafante ĉi agnoskon, la ĵurio de la lastaj Belartaj Konkursoj de UEA aljuĝis al NEVES, krom unu Honora Mencio, la du unuajn premiojn en la branĉo poezio kaj la trian en la branĉo eseo. Ĉi-konkurse premiigis ankaŭ du same talentaj E-verkistoj amikoj de nia gazeto, la hispanoj Liven Dek kaj Georgo Kamaĉo per la dua kaj tria premioj, respektive, en la branĉo prozo.

Kajeroj el la Sudo ege ĝojas kaj sane fieras pri ĉi sukcesoj de

esperantistoj tiel proksimaj al nia koro, kaj publike gratulas ilin pro ties meritaj laŭroj... **GRATULOJN!**

Alvoko pri solidara helpo al kubaj esperantistoj

En nia Redaktejo ni ricevis leteron de k-do Pedro A. Peña Martínez, de Santiago de Cuba, kun peto al la Esperantaj Grupoj kaj ĝenerale al ĉiuj esperantistoj de solidara helpo. Al niaj k-doĵ de tiu kuba urbo mankas ĉion por pluivadi: nutraĵojn, vestojn, medicinojn ktp. Por ilia minimuma disvolvo kiel esperantistoj al ili mankas: lernolibrojn, paperon, bulkraĵojn, ktp.

Bonvolu adresi vian helpon al la instruisto de la Grupo: Pedro A. PEÑA MARTINEZ; Corona 163. San Mateo y San Antonio. CP 90100-SANTIAGO DE CUBA (Cuba).

Nova prifilozofia verko

Eldonita de Barcelona E-Centro ĵus aperis prifilozofia libro verkita de nia estimata k-do Giordano MOYA ESCAYOLA. La libro, **Survoje al universala civilizacio**, 205 pĝ., konsistas el pluraj interesaj eseoj, kiuj profilas la trajtojn de la socia evolucio karakterizata de konkurado kaj militoj.



K-do Moya analizas per trafa rezonado la disvolviĝon de plej diversaj civilizacioj, de la neolitika ĝis la aktuala epokoj, kaj substrekas tiujn faktorojn kapablaj kaŭzi militon aŭ kontribui al la tutmonda paco.

Ni gratulas nian k-don Giordano pro la interesa verko kaj rekomendas ĝin al amantoj de filozofio kaj ĝenerale al ĉiuj legemuloj.

Prezo de la libro: 1.300 ptojn. Mendebila ĉe Libro-Servo de HEF;

Apartado 119 E-47080; aŭ Barcelona E-o- Centro; Carreras Candi, 34-36. 08028-BARCELONA.

LA 68-a SAT-Kongreso en Maribor

DEKLARACIO. La 68-a SAT-kongreso okazis de la 15 al la 22-7-1995 en Maribor, Slovenio, kun partopreno de reprezentantoj el 26 landoj, kadre de la SAT-statuto kaj de la kongrestemo **Tolero al minoritatoj**, kiel eduka organizo

konstatas:

- 1) -ke la tiel nomata "Nova mondordo", kelkajn jarojn post la fino de la «malvarma milito», tre malkontentigas la esperojn de la gelaboristoj kaj mezklasuloj en la mondo;
- ke la malarmado estas tute malkontentiga. La eta malarmigo ne estis uzata por krei kromajn laborlokojn en la sanigservo, edukado kaj industrioj, sed por pligrandigi la nombron de la senlaboruloj;
- ke mondscale senlaboreco daŭras kaj kreskas;
- ke la malriĉeco plivastiĝas interalie sub premado de Internacia Monda Fonduso (IMP);
- ke malegaleco pligrandiĝas kaj la diferenco inter tiuj kiuj ĝuas la riĉaĵojn de la mondo kaj tiuj, kiuj ne ĝuas ilin, ankaŭ plivastiĝas;

Tiuj ĉi konstatoj rezultas ofte de ekonomiaj politikoj faritaj de tiuj, kiuj havas la regpovon en multaj el tiel nomataj naciaj ŝtatoj de la mondo. ~~Estas~~ bone konate, ke ekzistas rilato inter tiuj ĉi sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj kaj naciismo.

Naciismo kaj ofte ŝovinismo denove floras en multaj landoj.

Militoj kaj persekutadoj abundas kaj eĉ estas farata "etna purigado". En tiu situacio, la rolo de UNO gravegas kaj memevidentiĝas, ke ĝi ne estas sufi ĉe demokrata organizo.

GVIDREZOLUCIO

La 68a SAT-kongreso kun partopreno de reprezentantoj el 26 landoj petas:

- ĉiujn LEA-ojn ke ili atentigu unu la alian pere de **Sennaciulo** kaj per rekta kontakto, pri ĉiu grava atako kontraŭ la homaj rajtoj de laboristoj kaj aliaj en iu ajn lando;
- okaze de tio organizi la sendadon de protestleteroj al registaroj kaj apogleterojn kun helpoj al sindikatoj kaj aliaj batalantoj kaj defendantaj demokratajn rajtojn kaj vivnivelon, tiel montrante al la mondo la tutmondan karakteron de SAT-agado kaj nian partoprenon en la monda progresiva movado;
- invitas la SAT-membrojn en ĉiuj landoj kie ne ekzistas LEA-oj kaj kie estas ebleco starigi proprajn LEA-ojn;
- invitas estontajn kongresojn kiel plej multe strebi apartigi prelegojn, ekskursojn, frakciajn kunvenojn de laborkunsidoj, tiel ke ili ne okazu santempe.

Kajeroj —
— *el la Sudo*



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIU: Str. Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Depósito Legal: Z-2398-88
Presejo: Eurocopia, S.L.